# CONCORDE

Organe Culturel
Trimestriel

**Direktoro :**
**Hubert FEREZ**

Abonprezo : 5 F
Subtenabono : 10 F
**C.C. Postal TOULOUSE 632.15**

## NICA STELO

PROVENCE - ALPES - COTE D'AZUR - MONACO

7, Avenue de Reims
NICE (Francujo)





- FOIRE DE NICE - STAND OFFICIEL DE L'ESPERANTO 1970 -

## 36 a KONGRESO DEL PROVENCA FEDERACIO EN TOULON

### 11/12 an de aprilo 1970

PROTOKOLO - La XXXVIa Provenca Kongreso de Esperanto okazis en Toulon la 11an kaj 12an de Aprilo 1970. Sabate vespere amika manĝo kunigis la jam ĉeestantajn gekongresanojn. La laborkunsido okazis dimanĉon matene en salono "Mozart" bele ornamita je francaj kaj esperantistaj emblemoj. Partoprenis ĉirkaŭ sepdeko da gesamideanoj el diversaj provencaj urboj;

Je la naŭa sidis ĉe la tribuno :

S-ano Gasse, fruepoka pioniro, Honora Prezidanto de la Provenca Federacio,

S-ano Bourdeaux, Generala Sekretario de U.F.E.
S-ano Garrigue, Prezidanto de la Provenca Federacio,
S-ano Meriglier, Prezidanto de la Centro de Toulon,
S-ano Saretto, Federacia Sekretario,
S-anino D. Jurquet, Federacia Kasistino

S-ano Meriglier bonvenigis la ĉeestantojn kaj diris sian ĝojon akcepti la 36 an Federacian Kongreson en Toulon kun la partopreno de tiaj eminentuloj kiaj S-anoj Gasse kaj Bourdeaux.

Danke respondis al organizintoj kaj partoprenantoj S-ano Garrigue. En sia Alparolo li reliefigis la renaskiĝon de Martigues la revigliĝon de Avignon, la konstantan agemon de Cannes kaj Nice Kaj substrekis la kuraĝajn klopodojn de Monako, kiu, post organizo de la pasintjara regiona kongreso, akceptos dum Pentekosto la 55 an Nacian Kongreson, kun partopreno de niaj italaj amikoj. Poste, senkulpiginte lokajn oficialulojn kaj deklarinte ke malfermiĝis la laborkunsido, li pasis la parolvicon al S-ano Bourdeaux, kiu amare sed objektive prezentis al la Kongreso la nunan situacion de nia Nacia Asocio U.F.E. Jaro sekvas jaron kaj daŭra malkresko pli kaj pli malkuraĝigas tiujn, kiuj senlace laboras por antaŭenpuŝi nian movadon. Tian evoluon oni nepre kaj rapide inversigu cele al resanigo de la Franca Movado.

Post tiu interveno, la Prezidanto pasis la parolvicon al la lokaj sekretarioj por la priagadaj raportoj.

Sinsekve raportis S-ano Jullien (Aix) - S-ano Saretto (Marseille) - S-ano Ferez (Nice) - S-anino R. Triolle (Junuloj) kaj la Federacia Sekretario poste legis la raportojn de S-ano Blarys (Arles), S-anino Humm (Avignon) - Sanino Bonnafous (Carpentras) - S-ano Lanzo (Cannes) - S-ano Colney (Gap) - S-ano Sidobre (Martigues) S-ano Mathis (Solliès-Ville) - S-anino C. Jurquet (Toulon) S-ano Deyrolles (Vitrolles)

Lokajn raportojn sekvis la ĝenerala agadraporto de la Federacia Sekretario. Unuafoja kontentigo venis el la nombro de la raportintoj sed, daŭre, raportoj venas nur okaze de la jara kongreso. Pli oftaj rilatoj Centroj-Federacio estas absolute necesaj por la bono ne nur de la Centroj sed ankaŭ de la Federacio kaj sekve de U.F.E.

La financan raporton prezentis poste S-anino D. Jurquet. Komparaj ciferoj montras kreskon de la membraro kaj sanan kason. La Prezidanto faris du proponojn al la Kongreso por utiligo de la mono en la kaso, pretigo de rondiranta ekspozicio aŭ aĉeto

de multobligilo por faciligi la laboron de la federaciaj Centroj. La Kongreso estas favora al ambaù projektoj ; la estraranoj mem decidos.

Agadan kaj financan raportojn unuanime aprobis la Kongreso.
Koncerne la Provencan Federacion, ĝenerala konstato, montras favoran evoluon kaj se ne grandan sukceson almenaù finon de malrapida kaj konstanta malkresko. Bonvolemo ne mankas, kiun bedaùrinde ne ĉiam kronas sukceso. Pluo estas ebla.

Nur unu deziresprimon pristudis la Kongreso. La propono ne estas novaĵo, sed ĉar la dekreto pri nedevigeco de la dua lingvo en la kvara klaso de la liceoj estas malfermita pordo por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn Carpentras proponas, ke la Estraro klopodu por akceptigi Esperanton, kiel nedevigan studobjekton en la kvara klaso de la liceoj. Post klarigoj de S-ano Bourdeaux koncerne tiun gravan demandon, la kongreso unuanime aprobas tiun déziresprimon.

Post la kongreso aprobis la reelekton de la triono de la konsilianoj de U.F.E., la agadan kaj financan raportojn de la Nacia Asocio kaj la destinon de la profitoj 68-69 en la budĝeto 69-70

La Sekvanta temo estis elekto de la kongresurbo 71 kaj de la Provenca Delegito ĉe la Nacia Kongreso en Monako. Sekve de propono de S-ano Lanzo, aprobita de la Kongreso, Cannes estos la urbo de la 37a Federacia Kongreso. Neniu sin proponinte por reprezenti la Federacion ĉe la 55a Nacia Kongreso, S-ano Garrigue konsentis esti la federacia delegito ; rajtigilon li ricevis tiucele de la federacia estraro.

Intervenis pri diversaj temoj S-aninor. Triolle pri la junuloj kaj vendado de Esperanto-libroj pere de profesiaj libristoj, S-ano Lanzo pri la projektoj en Cannes, S-ano Mathis pri sia agado en la regiono pere de la gepatra asocio, S-ano Koyac por saluti la Kongreson nome de la Esperantistaj fervojistoj kaj de S-ano Motto el Avignon.

Je la IIa la Prezidanto deklarinte, ke finiĝis la kongresdebatoj donis instrukciojn koncerne la oficialan akcepton fare de Magistrato je IIa30.

La kongreso iris do al la Urbodomo, kie ĉe la dekdua etaĝo, en bela salono-teraso kun rava panoramo al la rodo de Toulon, ĝin akceptis kun simpatie senafektaj vortoj Magistratano Lahilonne, kiu tostis al la sukceso de nia Kongreso.

Personaj aùtomobiloj de la partoprenantoj kondukis poste la Kongreson en Le Brusc por enŝipiĝo al insulo Les Embiez, kie la firmo Ricard servigis honoraperitivon kaj la tradician amikan manĝon.

Posttagmeze la gekongresanoj povis promeni laùlonge de la kajo en la jaktohaveno, ĝui la spektaĵon de belega panoramo kaj ĉefe viziti la riĉan Muzeon pri la Maro.

Disiĝo okazis sur la kajo en Le Brusc.
Dankon al organizintoj, komplimenton al la organizontoj.

Paul SARETTO
Generala Sekretario

CU VI NE FORGESIS..... sendi vian aliĝon al la 62a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO kaj 2a RENKONTIGO FRANCA-ITALA, MONAKA, kiuj okazos en Monte-Carlo, la 15-19an de Majo 1970 ?.....?.....?.....?.....?

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

## XXV a KONGRESO de SAT-AMIKARO en BEZIERS

Niaj legantoj devas scii ke SAT-Amikaro estas franclingva asocio por propagandi Esperanton en la sino de la laboristaj medioj. La kongresoj taùgas por la pérsonoj de modestaj kondiĉoj : ni ja manĝis po 5 F kaj loĝis po 6 F. "Unu Homaro, unu Lingvo" estas la devizo, sed la Amikaro montras ke oni povas krei senton al unuigita Homaro respektante la regionajn tradiciojn : sabaton vespere, ni havis la plezuron vidi la Dancojn kaj aùdi la kantojn en Okcitana lingvo de la Folklora Grupo "Las CofasBezierencas" kies gvidanto kantis regionan kanton en Esperanto. Dimanĉon vespere oni prezentis al ni belajn filmojn al gloro de la hejmlando.

Dum 4 tagoj, de la 28a ĝis la 31a de Marto, pli ol 100 Kongresanoj diskutis pri la diversaj problemoj de la Amikaro kaj pri baldaùa reeldono de la ne anstataùebla "Racia Kurso", kiu aperos modernigita kaj tute neùtrala por esti vendota en ĉiuj medioj. La Gazetaro aperigis longajn artikolojn kun pluraj fotoj ĉiufoje.

Intertempe, la kongresanoj iris duontage al Sète, kie de Mont St Clair ili admiris belan panoramon antaùe ol per ŝipetoj iri al Bouzigues por gustumi ostrojn (japandevenanjn) kaj la lokajn mitulojn. La Kongreso finiĝis per tuttaga ekskurso al modela vinkooperativo de Aspiran kaj poste al ĉirkaùa montaro.

Oni povis vidi en la Urbo plurajn panelojn pri la kongreso. En la belega Palaco, kie okazis la kongreso kaj la bankedo, la Urbestro de Béziers oferis honorvinon, la publiko povis viziti tre interesan ekspozicion kaj aĉeti librojn.

La venonta kongreso de la Amikaro okazos en Yvetot. Ci-jare, de la 25a ĝis la 31a de julio, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kongresos en Ausburgo, bela urbo de Bavario sur la vojo al Vieno,sidejo de la Universala kongreso. Kial ne profiti la okazon por viziti ambaù kongresojn ?

L. PELLETIER

## - R E N K O N T I G O J -

Dimanĉon 7an de junio - REGIONO de SERRES (Hautes Alpes)

"Kiel ni sciigis sur la lasta numero de "CONCORDE", ni invitas la Samideanojn de la regiono al Renkontiĝo en SERRES, dimanĉon 7an de junio 1970. La ekzakta adreso de la kunvenejo estas : kvartalo LES CHAMBONS, je 800 m de la centro de la urbeto, direkto al Grenoble. Ni kunvenos en gardeno de F-ino FAUCHER, membro de la Grupo de Gapo. Principe la manĝo estos eltirita el la sako sed ni povas certigi la surlokan manĝon por maksimume 20 personoj kontraù frua sciigo kaj partoprena antaupago da 5 frankoj al la pĉk de la grupo.

La programo ne ankoraù estas firme fikstag. Ĝi laù la vetero kons istos el promenado en la malnova urbo, ludoj aù banado en la apuda rivereto BUECH.

SERRES situas en ĉarma altprovenca valeto kaj estas facile atingebla ĉu per trajno ĉu per aùtomobilo. Tiel ni speciale invitas ne nur la Alpanojn sed ankaù la ... najbarojn ĉefe el NYONS, LE BUIS, CARPENTRAS, AVIGNON, NIMES, ALES, AIX, MARSEILLE, TOULON, NICE, CREST, MONTELIMAR, VALENCE VIENNE, GRENOBLE, LYON, K.T.P....

Ni antaùdankas pro via frua senpaga aliĝo kaj petas vin sciigi nin pri via alveno kiel eble plej rapide kaj plej malfrue la 28.5.70.

Atendante vian partoprenon, ni plej kore salutas vin."

La Grupsekretario, R. COLNEY

(Esperanto-Grupo-05 - GAP - C.C.P? Marseille 3069.37 Partopreno al Komuna manĝo : antaùpago 5 F. po persono - Indiki horon de alveno).

DIMANĈon 14an de junio - REGIONO de CARPENTRAS (Vaucluse)

"Tiu Renkontiĝo okazos dimanĉon la 14 an de junio en la farmdono nomita "La Verda Stelo". Tiu farmo staras apud rivereto "Lauzon", 1 Km post la urbo CARPENTRAS - route de BEDOIN - bela kaj kvieta loko, 300 m post la Akvoponto - Aqueduc. Aliparte, ĉiuj gesamideanoj kunportos siajn manĝaĵojn, krom se illi deziras manĝi ĉe la restoracio.

Ni do alvokas plej grandnombron da gesamideanoj partopreni nian familian Renkontiĝon por fari E-propagandon kaj, samtempe, konatiĝi kun la gesamideanoj.

(Por pluaj informoj bonvolu skribi al mi : Samuel Revest - Quartier du Four à Chaux - 84 CARPENTRAS)".

Samuel REVEST.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

INTERESAJ KOMUNIKAJOJ -

Cu vi deziras veturi al la kongreso en vieno je eksterordinare malmultekostaj kondiĉoj ?

Jen la propono de nia Samideano Emile Laugier, kiu veturos al la Universala Kongreso en Vienoper sia Peugeot 204 :

"Por iri al la Universala Kongreso en Vieno aùtomobile, prezo pri vojaĝo malmultekosta, triono de la fervoja bileto. Skribu al : Sinjoro LAUGIER, 26 - BUIS-les-BARONNIES."

II

Ni ĝoje sciigas vin ke :

en NICE, La Librejo "Ala Sorbonne", 23, rue Hôtel des Postes, kaj en ANTIBES, La librejo "Librairie du Cap" 7, place du Général de Gaulle, povas liveri al vi Esperanto-librojn.

III

Esperanto-Hejmo, en NICE : Gesamideanoj el la tuta mondo, vi estos hejme en "Hôtel de Noailles", 70 av. Jean Médecin. Estroj : Gesinjoroj PROFIZI.

## BONA SCIIGO - BONNE NOUVELLE

Venonta Ekspzicio de pentraĵoj de André LEONI, fama esperantista pentristo : nur unu Tago por la Esperantistaro, Dimanĉon 17 an de Majo 1970, en GALERIE KARSENTY, 51, Bd du Jardin Exotique, MONTE-CARLO.

KELKAJ VORTOJ sur le peintre André LEONI - Né en 1907. Copie du portrait du général de Castelneau (1916) fusain.

- Portraitiste au crayon (1923). Collection de portraits au crayon, retenue par la maison Bagnol et Farjon (1925) - Depuis, Paysages, natures mortes, nus, dans les expositions particulières et les salons = Paris, Biarritz, Marseille Nice. Salon des Peintres corses à Nice. Quai des Etats-Unis. Musée de la Marine (1967) -- Portrait de paysan corse reproduit par la Revue d'Art Moderne de Paris. Seul exposant à avoir les photos des portraits -- Salon de Nice 1969 - Paysage d'Ensuès au Musée de Martigues --- Dernière (en date) Exposition personnelle : Galerie Karsenty (mars 1970), 51 Bd du Jardin Exotique, Monte-Carlo.

## - IMITINDA EKZEMPLO -

Iom post iom la urbo GRAY (Hte-Saône) esperantiĝas dank' al la senĉesa klopodado de nia amiko Géo JUNIER : aperigo konstanta de Esperanto-Kurso en la ĉefa gazeto de Gray - Kurso oficiale inaŭgurita en la Urbodomo de la Direktoro de la ĵurnalo, de la Urbestro Députito Sro Vitter, de Fino Ozawa (Japanino), de aliaj urbestroj, de geprofesoroj K.T.P. Vasta Espranto-ekspozicio en la Urbodomo - Prezendato en la Televido - Publika kurso (la metodo en 22 lecionoj) - Kurso por blinduloj (sama metodo en "Braille") - En C.E.S. (5a klaso), profesorino per germana lingvo instruas Esperanton al 28 gejunuloj -- La Urba Konsilantaro nomis "Strato Dro Zamenhof" ununel la pli grandaj kaj trafikplenaj stratoj de la Urbo - Fine, ni aldonu ke, dum la tuta jaro, nia verda flago flirtas sur unu Placo same kiel en diversaj partoj de la urbo. Bravo JUNIER !

## VIVO DE LA GRUPOJ

AVIGNON -- Sekve de Kimie Ozawa, japanino el Tokio, kiu partoprenis kristnaskan feston en mia Lernejo kaj en la lernejo Courtine, multaj gejunuloj, kiuj aùdis la konversacion inter mi kaj nia samideanino japana, kaj vere mirigitaj, petis min malfermi en la lernejo plurajn kursaojn de Esperanto ; kursoj en 4 klasoj kaj a al du junaj instruistinoj, Mme Ducallar kaj Mme Bagnol. Unu vesperon finlanda instruistino, Sino Kerttù Vaatanen, loĝanta momente en Aix en Provence, vizitis niajn gelernantojn, kiuj ŝin salutis per la vortoj : "Bonan tagon, Sinjorino !"

Paralele, helpata de Sro Motto, emerita staciestro en Avignon, mi faras kurson al plenkreskuloj kaj al studentoj, ĉiun merkredon vespere.

La 28 an de februaro, Sro Villeneuve prezentis filmon pri IFEF- a Kongreso en Avignon.

Simone HUMM

---

CARPENTRAS - Preparado de la Regiona Renkontiĝo (Vidu paĝ. n° 5)

GAP - Preparado de la Regiona Renkontiĝo (Vidu paĝ. N° 5)

GRASSE - Prezentado de Esp. filmo en la vasta kaj belega "Kulturdomo". Inter la ĉeestantoj troviĝis S-ino de Moras, el Cannes, Sro Bellon, emerita Lernejestro, Sro Lanzo kaj 5 personoj el Magagnosc. La 3an de februaro venis Fino Kimie Ozawa, japana Samideanino ; kun ŝi tre agrabla kunveneto okazis ĉe Sro Bellon ; ni kune vizitis la parfumfabrikon "Fragonard". Nia tiea Esperantlingva interparolado tre impresis la laboristinojn kaj la oficistinojn.
Kurso de Sro Lanzo okazas ĉiun mardon je 18,30 h.

Pauline BARITEAUD

TOULON - Preparado de la Regiona Federacia Kongreso, kiu necesigis multe da demarŝoj. Ne tre granda aktiveco de la grupo, kiu tamen sukcesis atribui 2 stipendiojn por la kultuta Semajno en Grésillon. Tio povas esti tre ulila ĉar dank' al renkontiĝo kun eksterlandaj esperantistoj, niaj Tulonaj esperantistoj pli bone komprenos la valoron kaj la utilecon de Esperanto.

Camille JURQUET.

(Ni elkore gratulegas Sinon Camille Jurquet pro la, laŭ ĉiuj detaloj, bonege aranĝita Kongreso, kiu, kompreneble, solviĝis per bela sukceso !)

CANNES - Sukcesis 4 lernantoj ĉe la ekzameno por "Atesto pri Lernado". Malfermo de Esperanto-kurso, en Liceo Bristol, de la profesoro Lanzo.

MARSEILLE - Kiel kutime, la grupo kunvenas ĉiulunde vespere de la 18,30h. ĝis la 20a (prelegoj, konversacio, prezentado de diapositivoj).
La 26 a de aprilo, okaze de la datreveno de la fondaĵo de la Grupo, bankedo kunigis multajn membrojn en restoracio, apud Vitrolles, ĉe la bordo de la Lago de Berre. Post la manĝo, la partoprenantoj organizis bulludan konkurson. Estis por ĉiuj treagrabla tago en amika etoso.
- La ĉefa aktiveco de la Grupo estis la sendo de cirkuleroj al ĉiu parlamento de nia departemento (ĝeneralaj konsilantoj kaj urbaj konsilantoj) por ke ili transdonu al la Ministro de la Nacia Edukado voĉdonon pri la enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Multaj favoraj respondoj jam alvenis. Ni esperu, ke tiuj klopodoj plene sukcesos.

NICE - De la 5a ĝis la 16a de marto, Stand officiel de l'Esperanto à la Foire Internationale de Nice " (Vidu foton sur la la paĝo). Tiu stando, granda, belega, celtrafa, estis de ĉiu laŭdita, ĉefe de la Direkcio mem de la Foiro. Ĝi estis la verko de niaj gasamideanoj : Sroj Froehlich kaj Pazzini kaj F-ino Commino.
Esperanto kurso : Ĉiumerkrede, de la 20 a ĝis la 21 a en Hôtel de Noailles, 70, avenue Jean Médecin.

---oooooooooo---

AVIZO - Sro LEONI (3 R. Barsotti, Marseille - 3) estus tre dankema al tiu, kiu povus sendi al li la numeron 15 (Novembre 1969) de "CONCORDE"

---

LETERO de Sino HUMM
(Delegitino de UEA, al S-ro Sadler, Redaktoro de "ESPERANTO")

(S-ino Humm aludas pri numero de "Esperanto" aperinta en novembro 1969-n° 768), kiu publikigis, sur tuta paĝo - tipografia pastiĉo de "Heroldo", akran,

malafablan satiron titolitan "Doloroj de Esperanto) "Sinjoro", Mi estas esperantistino de malpli ol 10 jaroj. De pluraj jaroj, mi regule legas "ESPERANTO"n sed ankaŭ "HEROLDO"n kaj eĉ "ESPERANTO-GAZETO"n. Tial mi mem akiras miajn proprajn opiniojn pri tiuj tri gazetoj. Estas vere ke mi jam legis kritikojn pri UEA aŭ Universalaj kongresoj, sed mi neniam konstatis verajn atakojn kontraŭ la movado. Tiuj kelkfoje ŝajnis al mi ĝustaj kaj mi ne opinias, ke kanti laŭdojn pri personoj aŭ organizoj estas fruktodone kaj instigo al progreso.

Kontraŭe, la legado de la lasta numero de "ESPERANTO" konsternis min : Tiom da malboneco, tiom da malico, mi ankoraŭ neniam renkontis en iu ajn esperanta gazeto, kaj mi naive opiniis, ke esperanta movado estas ŝirmita kontraŭ internaj kvereloj !..... Ĉu vere UEA ne havas alian pli urĝan taskon ol tiamaniere amuzi siajn legantojn ?... Ĉu oni ne hontus montri tiajn artikolojn al siaj amikoj ?.. Ĉu UEA imagas, ke ĝi faras bonan propagandon por Esperanto per tiaj artikoloj ?.. Ĉu UEA estus fiera komuniki tiajn klaĉojn al oficialuloj de UNESCO ekzemple ?

Ni, simplaj esperantistoj, ne dediĉas tiom da tempo, tiom da energio, eĉ ofte tiom da mono por konstati ke la movado estas nesto de kvereloj !

Eĉ la plej furiozaj malamikoj de Esperanto ne farus pli bone ol ĵus faris via gazeto. Se vi deziras mortigi la movadon kaj Esperanton, vi tutcerte sekvas la bonan vojon ! Oni ja scias, kien kondukas internaj disputoj kaj kvereloj Ili malkuraĝigas la plej fervorajn adeptojn. Mi havas nur esperon, ke vi ricevos multajn leterojn kiel la mia, ke vi komprenos tiam ke ni havas pli bonan taskon farendan ol nin vundi reciproke."

---

## ..... NEREALA VOJAĜO.....

Mi havas loĝejon apud la fervojo
Kie ĉiutage pasas vagonaroj ;
En lito mi sonĝis, jen tiu ĉiu fojo
Ke vagonaroj veturis sur la maroj.

Por iom plezuriĝi per vojaĝeto
Dum suna tago, kiel turistoj faras
Mi prezentiĝis ĉe travida giĉeto
Pagis bileton kaj sur la trajno staras

Laŭlonge de l'ondoj iomete ŝaŭmantaj
Belaj marvirinoj al mi ekaperis
Grupeto da ili kun ĝojo kantantaj
Melodi' allogan, mian kor' konkeris.

Malfermis la pordon mi de la vagono,
Sed nek la trotuaron trovis, nek la grundon,
Subakv' alfundiĝis kiel la peza ŝtono
Atingis de l'maro la bluan profundon ;

Tiam al mi naĝis rava marvirino,
Ŝi min ĉirkaŭbrakis, sed en sammomento,
Vekita pro tim' de dronad' akcidento
Troviĝis en brakoj de l'kara edzino.

2 Februaro 1970 Louis VANNINI

---

Imprimerie : CENTRAL-COPIES
8 descente Crotti - NICE
Tél. : 85.92.52

"CONCORDE" - Inscrit à la commission Paritaire des Papiers de Presse sous le numéro 38.390

Le GERANT : Hubert FEREZ

**NOUVEAUTE A NICE !**

------- **COURS PERMANENT d'ESPERANTO** -------

(enseignement gratuit)

---

( Le nombre des Professeurs de notre club permet d'accepter,à tout moment, de nouveaux élèves )

Le Cours a lieu, chaque mercredi, de 20 h à 2I h à l'Hôtel de Noailles, 70. Avenue Jean Médecin - NICE;

AMIS DE NICE ET DE LA REGION.....................PROFITEZ-EN !

( Les inscriptions sont reçues, le mercredi, Hôtel de Noailles )

---

**INVITO (Invitation )**

CONFERENCE sur la SARDAIGNE

( Avec denombreuses diapositives)

**PRELEGO pri SARDIO** (kun multnombraj diapozitivoj)

de Sino J. OEHRI

MARDI, I2 MAI, "HOTEL DE NOAILLES" - NICE

---

-.-.-. UN GROUPE DE JEUNES ESPERANTISTES SUR LA COTE .-.-.-


L'Esperanto est en marche et en progression sur notre belle Côte d'Azur. C'est très bien. Cependant, les espérantistes, dans notre région - et ailleurs - sont en grande majorité des adultes, et si l'Esperanto veut continuer à progresser, il faut l'enraciner le plus possible chez les jeunes. Alors, étant étudiant, j'ai récemment contacté des amis, eux-mêmes étudiants, et comme ils m'ont donné leur accord sur la création d'un groupe de jeunes espérantistes, je vais donc bientôt former ce groupe, en juin.

Amis espérantistes qui lisez cet article, je vous demande d'essayer de contacter des jeunes, intéressés par l'Espéranto, pour pouvoir, nous autres jeunes, nous rapprocher le plus possible. D'avance, je vous en remercie....Ce groupe inscrira à son programme différentes activités et collaborera avec les autres groupements de jeunes espérantistes....Toute personne désirant des renseignements complémentaires sur ce projet pourra s'adresser au Comité "CONCORDE" - Hôtel de Noailles,Nice. Je me ferai un plaisir de les lui fournir durant le Cours d'Espéranto organisés par ce Comité, le mercredi de 20 h à 2I h

Georges FONTANA

---

## KRUCVORTOJ - (problemo de Norbert PAZZINI)



**Horizontale** : 1.- Favora sento por iu aù pri io. 2.- Du literoj de flava malsano. 3.- Grandvaloran - 4.- En ia loko - Kontraùa. 5.- Kvin literoj de sinonimo de mulato - Radiko de kora inklino - 6.- Konsentite de ĉiuj. 7.- Radiko de araba koboldo. 8.- Densigita oksigeno - Interjekcio -

**Vertikale** : 1.- Konfidenca persono - 2.- Returnire akuzative - 3.- En tiu loko - ĉefpunkto - 4.- El tre malproksima lando akuzative - 5.- Penso pri io - 6.- Sinonimo de faco pri volumo - Seksa sufikso - 7.- Orienta lando - 8.- Aldoni malgrandajn plibeligajn detalojn.

---

### Solvo de la antaùa krucvortenigmo :

**Horizontale** : 1 - Esperanton - 2 - Kalkano - Vi.
3 - Spi - Kero - 4 - Po - Dommeze - 5 - Irnia - Oa.
6 - Zenito - Ion. 7 - Il. Ni. Voli. 8 - Memon.
9 - Arkado - Go. 10 - Du - Salutoj.

**Vertikale** : 1 - Ekspozi. Ad. 2 - Sapo. Eliru. 3 - Pli. In.
4 - Ek. Drinkas . 5 - Rakonti - Da. 6 - Anemio. Mol.
7 - Normà - Venu. 8 - Oe. Iom. 9 - Ov. Zoologo.
10 - Niceaninoj.

---

**KARAJ GEAMIKOJ** ... Vi konstatas ke, por doti nian regionan movadon, de ĉiam pli kaj pli potenca presorgano, ni konsentas daùrajn, fidelajn, ĉiuspecajn oferojn ...Ĉu ni ne meritas, ke vi ankaù iomete kontribuu - almenaù, per via abono, al nia komuna verko ?

---

IOM DA Serĉo !

### Ankoraù unu alian !

Du sekretariinoj antaù siaj skribmaŝinoj. La unua vespirante :
- Kiel ŝike vestas sin la estro !
La dua, ankaù vespirante :
- Ho jes, kaj tiel rapide !

(el la nica literatura revuo)